


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ N-ro 2 (833) 2002 ✧

PASKO: DONACO AL LA MONDO



Vaclav LAMR

ORTODOKSIO

**Nia revuo • Jarraportoj
Kongresa regiono**

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun
UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH
Heemskeerck ☎+31 251 231941;
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎+31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎+49 7131 162688;
✉ slkrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume € 20,- ☛ Membro-subtenanto
€ 30,- ☛ Nura abono: pagante rekte al KELI
€ 16,- ☛ pagante al Libroŝerbo € 18,- Sendoj
de okcidentaj monbiletoj per registrita letero
al la kasisto de KELI ☛ Se estas en via lando
UEA-poŝtgironto (informigu ĉe UEA)
bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p**
de KELI ☛ Nederlanda poŝtgironto de KELI:
5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumondata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎+33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: € 16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al
la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reproso aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎+48 32 763 37 13; ✉ hejme@inetia.pl

ENHAVTABELO

- 27 Ortodoksio kaj Esperanto
Adolf BURKHARDT
- 29 Tekstoj el ortodoksio
Larisa KUZMENKO
- 33 Du leteroj pri la enhavo de nia revuo
- 38 Financa raporto
- 41 Sekretaria raporto
- 43 La regiono de nia kongreso
- 46 Nekrologoj

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gelegantoj,

Bedaŭrinda kutimo: mi prokrastiĝis en la pre-
paro de nia revuo. La rezulto estas jena: anstataŭ
paroli al vi pri la ĉefa momento de nia fido, no-
me la releviĝo de nia Sinjoro (vidu la bildon sur
la koverto), mi babilos kun vi pri politika even-
to en mia lando.

Vi certe aŭdis ke okazis elektoj por prezidan-
to en Francio. En la momento kiam mi verkas ĉi-
tion, ni troviĝas inter la du balotoj. En Francio,
se nenlu ricevis pli ol 50% da voĉoj je la unua
baloto, nur la du unuaj rajtas resti en la dua ba-
loto. Kaj jen, pro diversaj kaŭzoj, multaj kandi-
datoj, tro da nevotantoj, ktp., la dua troviĝas es-
ti ekstremdekstrulo, kun naciismaj kaj vere ra-
sismaj paroloj kaj promesoj. En Francio, tio es-
tis politika tertremo.

En demokratio, ĉiu havas la rajton je sia pro-
pra opinio kaj baloto. Sed la malamo al fremdu-
loj estas komplete neakceptebla, ĉefe por krista-
noj. Kaj krome, kiel esperantisto, mi ne povas ak-
cepti tian centriĝon sur la propra nacio. En kel-
kaj regionoj de Eŭropo, tiu nocio povas eble en-
havi signifon, sed en Francio tute ne. Francio es-
tas lando loĝata de tre diversaj personoj. Mi es-
tas tre malofta persono, kun inter miaj prapatroj
neniu konata persono veninta el alia lando. Tu-
te ne eblas difini, kio estas franco. Kaj nun, po-
litikisto, puŝata de la timo pro bruoj de malor-
do, alvenas al la rando de la potenco, kun ideoj
tiom malhumanaj.

Ne kredu ke Francio faŝistiĝis. Mi esperas ke
la signalo vekis la civitanojn.

Nia espero ne troviĝas en la defendo de iu
identeco kontraŭ la aliaj, sed en tiu, kiu mortis
sur la kruco, kaj releviĝis.

Varmajn (post-)paskajn salutojn.

Philippe COUSSON

KRISTANISMO

ESPERANTO KAJ ORTODOKSA EKLEZIO

En 1887, la unua broŝuro pri Esperan-
to aperis en la rusa regno en kvar lin-
gvoj, kies unua estis la rusa. Tute natu-
re, la plimulto el la unuaj adeptoj estis
ruslandanoj, inter ili certe multaj orto-
doksaj kristanoj. En 1895, «La Esperan-
tisto», kiu estis la unua revuo por la anoj
de la nova lingvo, havis en tri kvaronojn
de siaj legantoj en Ruslando. Pri ia orga-
nizita aktiveco en ligo kun la ortodoksa
eklezio ne estas informoj. Des pli elsta-
ras kelkaj personoj.

La ruso Ivan Genadijeviĉ ŜIRJAEV,
pseudonime Ivan MALFELIĈULO, naski-
ĝis je la 11a de aprilo 1877 en Vereteja,
gub. Jaroslavl, kaj mortis je la 23a de okto-
bro 1933. Unue li estis instruisto, de 1904
ortodoksa vilaĝa pastro en Vologda. Post
lia morto, pastro K. M. KOLOBAŜKIN oka-
zigis diservojn en Esperanto je lia me-
morio, en la preĝejo de Lomigory, je la
6a kaj 11a de novembro kaj je la 1a de de-
cembro. En 1895, ŜIRJAEV lernis Esperan-
ton kaj dum sia tuta vivo seninterrom-
pe uzis ĝin. Li partoprenis la literaturajn
konkursojn de SFPE (Societo Franca por
la Propagando de Esperanto), «La Ondo
de Esperanto» (organo de la Ruslandaj
esperantistoj), La Internaciaj Floraj Lu-
doj (organizataj de katalunaj esperanti-
stoj, laŭ modelo de kataluna poezia kon-
kurso) kaj aliaj. Li kunlaboris al «L'E-
spérantiste» (organo de francaj esperan-
tistoj), «Lingvo Internacia» (posteulo de
la supre nomita «La Esperantisto»), «La

Ondo de Esperanto» (Ruslanda), «Kata-
luna Esperantisto», «Literatura Mondo»
(de KALOCSAY kaj J. BAGHY en Budapeŝt)
kaj aliaj. Li originale verkis i.a. Sep Ra-
kontoj (1906), La ciganino (1907, en brajla
presita), Tra la loko ensorĉita (1913), Forta
Impreso (1914), Peko de Kain (1933).

Gravaj tradukoj restis en manuskrip-
to: Fratoj Karamazov (DOSTOJEVSKIJ),
Milito kaj Paco (L. TOLSTOJ), La Dia Li-
turgio (S-ta Johano Krizostomo, «S. Jo-
hano Orbuŝulo»; alia versio de S. Pru-
dho nun aperis en ADORU; estus inte-
rese kompari kun la manuskripto, kiu
eble konserviĝis en Vieno). Ĝis 1930 li
kompilis 2092 alfabeto ordigitajn tek-
stojn sub titolo «Esperanto-Enciklo-
pedio». Tio fariĝis la kerno de la po-
sta «Enciklopedio de Esperanto». En du
imponaj volumoj ĝi aperis en 1933 ĉe Li-
teratura Mondo en Budapeŝt. Unuvolu-
man represon, sen la bild-parto, aperi-
gis Hungara Esperanto-Asocio en 1986.
Titol-paĝe, ŜIRJAEV honore estas noma-
ta «iniciatinto-ĉefredaktoro».

Alia ruso, siberiano Inocento SERIŜEV
naskiĝis je la 15a de aŭgusto 1883 en Ku-
dara. De 1907 ĝis 1917 li laboris kiel orto-
doksa pastro en Siberio. Multe li okupis
sin pri popol-eduko. Dum la cara reĝimo
li sidis en malliberejo pro politika akuzo.
Sovetio li forlasis «pro ruĝa despotismo
kaj arbitro» kaj iris al Japanio por tri ja-
roj, kie li esploris la japanan eduk-siste-
mon. Poste li ekloĝis en Sidney, Aŭstralio.
Esperanton li lernis en 1910 kaj fariĝis
unu el la pioniroj en Siberio.

En la sama jaro, kun sia fratino Varva-
ra, li faris rondvojaĝon tra 13 landoj de

Eŭropo per Esperanto kaj ĉie propagandis la lingvon. Li aperigis 250-paĝan libron pri Siberio (1914) kaj du volumojn po centpaĝajn de revuo «Oriente» en Harbin.

Plurajn altajn funkciojn en la Esperanto-movado havis la rusa ortodoksa episkopo Gabriele en Ĉuguev. Li naskiĝis kiel Mikaelo KIPERMAN en 1891 kaj estis esperantisto de 1909. En 1912 li faris per-Esperantan vojaĝon tra Germanujo, Francujo, Hispanujo, Italujo kaj Aŭstrio. De 1910 ĝis 1914 li servis kiel sekretario de la Esperanto-grupo en Kiev. Li estis konsulo de UEA kaj organizis la Duan Tutruslandan Esperanto-Kongreson 1913.

Unuopaj pastroj aktivis diversloke, sed evidente ankaŭ tie sen krei organizon.

En 1922, János KOZMA en Nyírcsászár, Hungario, eldonis gazeton «Katolika Revuo», kun subtitolo «pri religiaj, kulturaj kaj literaturaj aferoj.» De januaro ĝis oktobro aperis kvin kajeroj. Erare la revuo eniris la bibliotekan katalogon de Aalen en la rubriko «rom-katolika». Sed montriĝis, ke temis pri «greko-katolika, kun roma rito». Denove, la posta sorto restas nekonata.

SANDGREN en sia «Katalogo de Religia Literaturo» mencias la subtenon al Esperanto de la cipra prezidento, ĉefepiskopo MAKARIOS, grandan kurson en hungara ortodoksa pastra seminario, same en rumanaĵoj, kaj legadon de la evangelio en Esperanto dum grandaj pasko-diservoj en Rumanio, Usono kaj alie. Sed pri tio necesas esplori pli detale, por trovi dokumentojn.

En 1963 okaze de la Universala Kongreso en Sofia, ortodoksa pastro Dimitar ANDREEV, KELI-ano, predikis en Esperanto en la katedralo Aleksandr NEVSKI. Evangelia Diservo okazis en la Centra Metodista Preĝejo, kun prediko

de Adolf BURKHARDT. Malgraŭ la bonaj personaj rilatoj, komuna aranĝo tiutempe estis neimagebla kaj neebla.

En Finnlando, de 1970 ĝis 1972 aperis 10 numeroj de «Unu Sankta Katolika Apostola Eklezio (ortodoksa kristanismo)», multobligita bulteno. Redaktis kaj eldonis Matti SAVELJEW. En la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen troviĝas plena kolekto.

En la Kristana Esperantista Jarlibro de 1975, inter la 25 bulgaraj KELI-anoj, 9 estis ortodoksaj pastroj (krome, unu kongregacia = reformita pastoro, kaj la prezidanto = episkopo de la kongregacia eklezio, kiu poste multajn jarojn suferis en karcero). Aparte aktiva estis arkimandrito Nikolai KACARSKI. Kun li, en kongresa ekskurso, Adolf BURKHARDT vizitis la konfiskitan klostron Rila; dum la oficiala ĉiĉeronino laŭdis la altan signifon de la monaĥejo por la bulgara lingvo kaj la bulgara kulturo entute, la arkimandrito flustris al li «tion ili ŝtelis de ni!» — kompreneble ĉion en Esperanto. Lia nomo estas ankaŭ en la Adresaro de KELI 1997, kun du aliaj pastroj kaj la vidvino de ZJAPKOV, la menciita eklezia prezidanto. Pri ilia nuna situacio mankas informoj.

En 1978, en la Universala Kongreso de Esperanto, okazis ekumena Diservo en la ortodoksa katedralo de Varna. La liturgion komencis metropolito Johano en praslava lingvo, tamen la tekston el Genezo 11 ĉantis arkimandrito KACARSKI en Esperanto. Predikis Adolf BURKHARDT. La eŭkaristia liturgion nur por rom-katolikoj celebris la tiama IKUE-prezidanto Czesław BIEDULSKI. Ortodoksaj pastroj kiuj bone parolis Esperanton, sidis sur la podio dum la fakaj kunsidoj de IKUE kaj KELI, tiel aranĝitaj ke la tuto fakte rolis kiel ekumena kongreso kaj ankaŭ rice-

vis vican numeron.

En 1988, kadre de la KELI-kongreso en Jyväskylä, la estro de la ortodoksa eklezio de Finnlando, ĉefepiskopo Johano, prelegis (svede, kun bona interpreto al Esperanto) pri sia eklezio. Bloke la kongreso partoprenis poste la vespron en la ortodoksa preĝejo de Jyväskylä, kun posta muzikado en la preĝeja ĝardeno.

En 1995, Larisa KUZMENKO eldonis bultenon «Ortodoksa Heroldo» en sia urbo Niĵnij Tagil, Sverdlovskaja obl. Ĉu sekvis aliaj numeroj, ne estas sciata; detaloj mankas.

En 1997, Larisa KUZMENKO ĉeestis la Duan Eŭropan Ekumenan Kunvenon en Graz kaj tie kunlaboris (verŝajne ne la sola ortodoksa membro en nia 42-persona teamo; inter la rumanoj certe unu aŭ du estis ortodoksaj) ĉe la stando de la ekumena labor-grupo.

En 1999 en Gliwice, la Ekumenan Kongreson salutis la prezidanto de nove formita Esperanto-asocio TOLE, Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista, bulgaro d-ro Bojidar TOROV(?) el Bulgario. Li parolis pri preparata kongreso en majo 2000. Ĉu tiu okazis aŭ ne, neniu el ni scias. Poste ne plu venis informoj pri TOLE, ekzemple pri tio, kiel reagis niaj KELI-anoj ortodoksaj — ĉu ili aliĝis?

Pastor Serhij PRUDKO celebris la Dian Liturgion de S-ta Krizostomo, asistate de malgranda kant-grupo el sia hejma paroĥo en Kiev. Kuncelebris la ĉeestantaj pastroj de IKUE. La aliaj kongresanoj silente partoprenis la Diservon.

Dum la faka kunsido de KELI en Zagreb 2001, kun IKUE kiel gasto, unu ĉeestanto levis la demandon, kial ne estas ortodoksa ekvivalento de IKUE kaj KELI. Adolf BURKHARDT respondis, ne havante informon pri la vivo aŭ morto de TOLE, ke laŭ li ne estas rekomendinde

KELKAJ ELDIROJ DE LA SANKTULOJ

„Necesas malami kaj persekuti pekojn, sed ne la pekantojn”.

La protopastro P. Sokolov

„Se ofendo estas en via koro, memoru pri Jesuo Kristo kaj Liaj suferoj — pensu pri tio, ke via sufero estas ege malgrava kompare kun la suferoj de nia sinjoro kaj tiam kvazaŭ per akvo vi estingos vian suferon”.

La Sanktiganto Gregorio la Teologo

„Vi trafos ĉielon, se vi havas amon, ĉar tie estas nur amo”.

La protopastro Igor Tolmaĉjov

Adaptita de Larisa KUZMENKO

fondi novajn asociojn (metodista, baptista, adventista, luterana, ortodoksa k.s.), se tiuj antaŭvideble nur vegetos pro manko de membroj, sed ke prefere oni kunlaboru kadre de KELI kiel sekcio, utiligante la jam ekzistantan organizon. Nenio malhelpas, ke formiĝu tiaj internaj strukturoj, dum, kontraste, apartaj novaj grupoj riskas havi efemeran kaj malfortan vivon kaj tiamaniere malutili al la reputacio de nia lingvo, — se kreiĝas nur ruinoj neniam kompletigitaj.

Tia aliĝo al KELI rekomendiĝas pro la jam ekzistanta granda diverseco de KELI laŭ konfesia konsisto kaj pro la ŝanco krei kontaktojn al aliaj. Sperto montras, ke izoluloj nur malofte persistas. La jarlibro de UEA liveras ĉiujn bezonatajn adresojn. Landaj sekcioj kaj reprezentantoj estas multnombraj. Centra adreso de KELI estas la sekretario, s-ino Els VAN DIJK-KUPERUS, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando.

Kompilis Adolf BURKHARDT por eventuala uzo en la rusa traduko de «Esperanto, la nova latino de la eklezio», post atentigo de la tradukanto, ke plene mankas la ortodoksa elemento.

ESPRIMOJ, ELDIRITAJ DE LA RUSA PATRIARKO ALEKSIO LA DUA

„Mi volus memori pri du leĝoj en la sfero de la eklezia instruado. La unua estas: Neniu povas instrui lernanton pri tio, kion li ne povas mem plenumi. Kaj la dua estas: Lernanto ne povas kompreni novan aĵon, se li ne plenumos en sia vivo tion, kion li jam scias. La ĉefa mistero de kristanismo estas nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu vivas en ni. Ni diras al homoj pri bona aĵo, la Dia Regno, kiu venis en sia plena potenco kaj eniris niajn animojn kaj vivojn. Dio, aganta en homoj, kaj homoj, servantaj al Dio en spirito, estas Eklezio. Tiu pastro kaj instruisto, kiu elinterne ne tuŝis la misteron de Eklezio, ne estas bona”.

„Nun ne nur ortodoksaj kristanoj, sed ĉiuj niaj sampatrujanoj, kiuj konscias pri la neceseco de la reveno al la Ekleziaj fontoj kaj historiaj radikoj de sia popolo, atendas de la ortodoksiaj pastroj pli aktivan partoprenon kaj inspiroplenan gvidon en la agado de la eklezio-historia renaskiĝo”.

„Por ni ortodoksiaj homoj la plej grava en nia kristana vivo estas Dia liturgio. En liturgio okazas vivoplena renkontiĝo kun nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj ni ĉiuj unuiĝas kun Li”.

„Dia liturgio sanktigas ne nur homon, sed la tutan naturon; ĝi klarigas la tutan strukturon de la kreita mondo”.

Adaptita de Larisa KUZMENKO

KIEL OFTE NI DEVAS KOMUNIIGI?

La Sanktiganto Johano ZLATOUSTO respondis jene: Ju pli ofte, des pli bone. Tamen antaŭ la komuniigo necesas pentofari kaj konfesi ĉiujn pekojn ĉe pastro, kiu nome de Dio pardonas pekojn.

Necesas prepari sin por komuniigo, tio estas fasti dum tri tagoj kaj legi kanonon al nia Savanto, preĝon al Dipatrino kaj kanonon al la Anĝelo la Gardanto - antaŭ dimanĉo.

Antaŭ lundo necesas legi la samajn kanonojn kaj la kanonon al la Arĥiangeloj.

Antaŭ mardo necesas legi la samajn kanonojn kaj anstataŭ la kanonon al la Arĥiangeloj la kanonon al la Johano la Antaŭiranto.

Antaŭ merkredo necesas legi la kanonon al la Savanto Dipatrino, kiu estas Odigitrio kaj la kanonon al la Anĝelo la Gardanto.

Antaŭ jaŭdo necesas legi la kanonon al la Savanto, al dipatrino, preĝon al la Anĝelo la Gardanto, Apostoloj, kaj kanonon al la Sanktulo Nikolao.

Antaŭ vendredo anstataŭ la kanono al la Savanto legu la kanonon al la Viviganta Kruco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, legu preĝon al Dipatrino, la kanonon al la Anĝelo la Gardanto.

Antaŭ sabato legu la kanonon al nia Savanto, kaj ateston kun la kanono al la Dipatrino anunciacia kaj la kanonon al la Anĝelo la Gardanto kaj la kanonon al ĉiuj sanktuloj.

Adaptita de Larisa KUZMENKO

PRI LA VIVO DE LA RUSA SANKTULO PAISIO VELIĈKOVSKIJ

(memortago estas la 28an de novembro)

La respektinda Paisio naskiĝis la 21an de februaro 1722. Li estis la dekunua infano en la familio de pastro. Lia laika nomo estis Petro.

Dum longa tempo ilia posteularo havis lokon de protopastro en la Katedralo de la Asumpcio de la Plejsankta Dipatrino en la urbo Poltava, ĉar tie diservis praavo, avo, patro kaj poste la maljuna frato de la estonta sanktulo. La avino de la sanktulo estis la priorino de la Malnov-Pokrova virina monaĥejo, en kiu poste lia patrino monaĥiniĝis.

Paisio lernis gramatikon kiel ĉiuj infanoj, legante Psalmaron, kaj aliajn ekleziajn librojn: Novan kaj Malnovan Testamenton, vivojn de la sanktaj homoj, instruojn de la sanktulo Johano Zlatousto kaj Jefremo Sirin.

Li estis trankvila, humila knabo kaj neordinare silentema. Kiam li fariĝis monaĥo, li jam estis plenaĝulo. Antaŭ monaĥiĝi li estis studento de la Kieva Eklezia Akademio.

En la Lubeĉa monaĥejo la novico ricevis taskon: kopii librojn. La unua libro, kiun li kopiis, estis "Lestvitsa" (ŝtuparo) de la sanktulo Johano Lestviĉek. La libro fariĝis unu el liaj plej ŝatataj libroj.

Unu evento tre bone karakterizas la animan staton de la juna monaĥo. La sankta Paisio ricevis taskon gardi la vinberujon de la monaĥejo. Ĉi tio estis la plej peza zorgo, ĉar necesis senĉese atenti. Unufoje la monaĥo fordormis la komencon de la Diservo. Vekiĝinte, li ne kuraĝis eniri la preĝejon, sidiĝis sur la teron kaj malĝoje ploris. Oni sendis

homon al li, ĉar li ne kuraĝis veni eĉ en refektorion. La sanktulo malĝoje ploregis kaj petis pardonon ĉe la monaĥo. Post tio li decidis tute ne dormi kaj ripozis sidante sur iu benko.

La maljuna Paisio multe studis la verkojn de la sanktuloj. Li regule legis la Sanktan Skribon. Li reskribis kaj kopiis multajn manuskriptojn kaj malmulte ripozis. Ankaŭ malmulte li manĝis. Li portis malbonan vestaĵon.

En la 18a jarcento la maljuna Paisio loĝis en Afono. Tie li multe preĝis kaj senĉese studis laborojn de sanktaj homoj. Post tio li translokiĝis en Moldavion. Ĉi tie li tradukis la ekleziajn librojn en la slavan kaj moldavan lingvojn. Inter la libroj estas la verkoj de la sanktuloj Antonio la Granda, la sankta Johano Damska, la Sanktiganto Vasilio la Granda, respektindulo Grigorio Sinaito kaj la aliaj. La biblioteko de la verkoj de la sanktuloj eniris la bone-konatan en Ruslanda Eklezio „Libron de la amo por bonago”.

Tamen Paisio ne nur tradukis librojn. Li mem faris monaĥejajn regulojn. Dum vesperoj li legis ekleziajn librojn al monaĥoj, al novicoj. En la monaĥejo regis la plena obeemo, „saĝa preĝado” kaj libro-legado kaj manlaboro. La monaĥejo havis malsanulejon, hotelon kaj metiejojn.

Preskaŭ ĉiuj rusaj asketoj de la 18a kaj 19a jarcentoj ricevis influon de la sanktulo. Kun la heredo de la sanktulo estas ligita la historio de la granda sankta loko de la Ortodoksia Ruslando — la Optina Pustin (Dezerto). La unuaj grandaj optinaj asketoj — Leo, Makario, Moseo estis la lernantoj de la lernantoj de la sankta Paisio. „La libro de amo por bonago” estis la surtabla libro de Proĥoro Moŝnin, la estonta Serafimo Sarovskij.

Laŭ la vortoj de historiisto de la Ru-

La memortago de la Sanktulo Georgo estas la 6a de majo. Sankta Georgo estas la protektanto de militistaro kaj lia bildo estas sur la antikva blazono de Moskvo. La sanktulo simbolas la venkon super diablo tio estas la antikva serpento (legu Apo 12:3 kaj 20:2).

En Sverdlovsk regiono, nuntempa centra urbo estas Jekaterinburgo, dum la cara reĝimo estis 500 preĝejoj kaj temploj, post revolucio en la Sovetia tempo funkciis nur dudek.

Kupolo estas la supra, kaskoforma parto de la templo, kronita per kruco. Malgranda kupolo estas nomita „papa-veto” aŭ „cepeto”. Unu kupolo simbolas la unuecon de Dio, perfektecon de kredo. Du kupoloj simbolas du naturojn de Dia homo Jesuo Kristo. Tri kupoloj simbolas la Triunuon. Kvar kupoloj simbolas kvar Evangeliojn. Kvin kupoloj simbolas kvar Evangeliiistojn kun nia Sinjoro meze. Sep kupoloj simbolas sep Ekleziajn Sakramentojn kaj sep Ekumenajn Konciliojn.

Dum komunio la unuaj estas komuniĝantaj la servistoj de altaro, poste monaĥoj, infanoj kaj nur poste ĉiuj aliaj. Antaŭ la kaliko necesas fari adorkliniĝon

»»

sa Prasvoslava Eklezio Georgio Dedatov: „Paisio Veliĉkovskij fariĝis patro de la rusa asketismo. Senpere ligita kun li Optina Pustin kaj Sarov fariĝis dum multaj jaroj la centroj de la eklezia vivo. Ili estis du fajretoj ĉe kiuj varmigi sin la frostiĝinta Ruslando”.

Adaptita de Larisa KUZMENKO

kaj krucsigne meti la manojn: dekstran manon super la maldekstran.

La honoro de la sanktaj ikonoj de la Ortodoksa Eklezio ne estas nur rito. Tio estas dogmo de la Eklezio, kiu estas konfirmita de la sepa Ekumena Koncilio kaj fiksita per la sango de multaj martiroj kaj konfesantoj.

Adaptita de Larisa KUZMENKO

ELDIROJ DE SANKTULOJ PRI ESTROJ KAJ SUBULOJ

„Multaj homoj regas super homoj, sed mem estas sklavoj de peko kaj kaptitoj de siaj pasioj”.

Sanktulo Tiĥoho la Zadona

„Estro ne devas esti kolerema kaj incitiĝema por ke li ne pereigu ĉiujn malobeantojn”.

Sanktiĝanto Dimitrio la Rostova

„Tiu, kiu obeas al la estroj, obeas Dion”.

Sanktiĝanto Johano Zlatousto

„Kiel incensilo per bonodoro plenis aeron kaj ĝuigas flarsenton de ĉiuj antaŭstarantoj, tiel same la virta sinjoro aŭ sinjorino servas por la instruo kaj savo por ĉiuj, kiuj loĝas apud ili”.

Sanktiĝanto Vasilio la Granda

Adaptita de Larisa KUZMENKO

Kiu KELI? Kiu Dia Regno?

Estimata Sinjoro kaj kara frato en Kristo,

Jam antaŭ longe mi ricevis vian poŝtkarton kaj poste ankaŭ aliajn foliojn koncerne *Dia Regno* kaj KELI.

Post longedaŭra hezito mi jen turnas min al vi petante kelkajn klarigojn.

La celo de KELI dekomence estis diskonigi la Evangelion de Jesuo al diversnaciaj esperantistoj. Traleginte kelkajn disajn numerojn de *Dia Regno* mi ekhavis impreson ke la ĝenerala esperanta temaro invadis la paĝojn de *Dia Regno*, kristana eldonaĵo. Miaj okuloj eĉ trafis interredaktoraĵon en kiu nekristana Esperanto-aktivulo parolegis pri la „pluvivo” de l' idealoj de ZAMENHOF kaj HODLER.

Kiuj ni estas: homadorantoj aŭ Di-adorantoj?

Hezitis min ankaŭ la troo de ekumenaj. Mi kredas ja, ke ĉiuj denove naskiĝintaj kristanoj apartenas al la sola kaj unu Eklezio de Kristo. Se ĝi estas **unu** kaj **maldisa**, pri kiu plia unuiĝo temas?

Tamen ni atentu. Ekzistas „eklezioj”, kiuj nomas sin „kristana”, sed aprobas kaj eĉ benas samseksajn „geedziĝojn” tiel piedpremante la sangon de l' Interligo. Unu el tiuj estas la t.n. Remonstranta „eklezio” en Nederlando, kies pastoro ofte aperigas sian nomon surpaĝe de *Dia Regno*.

Nun, kiam mi surpaperigis la kialojn de miaj duboj kaj hezitoj, via klarigo estus vere dezirinda kaj bonvena, kaj mi antaŭdankas vin pro via respondo.

Via en Kristo Jesuo

Yenovk LAZIAN

PRI „KRISTANA MISIO”

Litovia kristana grupeto konsentis labori en la Misia laboro, sed neniun sperton transprenis. Ni komencis labori tiel, kiel ni komprenis kaj jam ricevis kvazaŭ riproĉojn kvazaŭ proponojn. Mi iom korespondis kun miaj amikoj — gefratoj kaj iom pridiskutis la problemon. Ni diskutis pri la estinta nomo kaj pri la metodo de la agado.

Nun pri la nomo. Tio, kompreneble, estas mia opinio kaj opinio de nia grupeto. Ĝis nun estis nomo „*Esperanto Misio*”. Kion signifas la nomo? Laŭ ricevita longa raporto **pri la misio** kaj materialo mi komprenas, ke antaŭ multaj jaroj ĝi estis Kristana misio de Svedio. Pro la aktiveco de la kristanaj geesperantistoj kiel sekcio fondiĝis Esperanto Misio ĉe la Sveda Misio. Kiel Svedia organizaĵo tio estis trafa nomo — inter kristanoj propagandi kaj instrui Esperanton, montri taŭgecon de la lingvo, eĉ uzi kiel ekumenan lingvon. Nun, kiel mi komprenas, la misio fariĝis Esperantista. Do la nomo devus esti ne „*Esperanto Misio*”, sed „*Kristana Misio*” aŭ „*Esperantista Kristana Misio*”. Tiu nomo signifus, ke ĝi estas internacia kaj celas disvastigi kristanismon. Mi preferus pli mallongan nomon. Do nia emblemo signifas: Kristana Misio de KELI.

Dum diskutado estis ankaŭ opinio, ke ĝi devas servi ankaŭ kiel Esperanto Misio. Mi pensas, ke ni ne organizos Esperanto-kursojn. Por tiu celo estas aliaj laborantoj, sed pri la uzado de la lingvo, lingvaj problemoj, kompreneble, ni di-

skutos.

Kiamaniere agi? Mi ricevis proponon anonci en gazetoj, revuoj pri la agado. Seke anonci mi ne povis kaj tiucele estas skribita ĉi tiu artikolo.

Nun mia opinio pri la Kristana Misio kaj misiistoj aŭ misiantoj. Kiu estas misianto? Ni pripensu la frazon „*Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi*” (Mateo 28:19-20). Al kiu estis diritaj tiuj ĉi vortoj? Ĉu nur al apostoloj, aŭ episkopoj, pastroj? Miaj karaj, mi pensas, ke ili estas diritaj al ni ĉiuj. Al ĉiu kristano. Ĉiu kristano devas instrui siajn proprajn infanojn kaj bapti. Instrui ne nur proprajn infanojn, sed ankaŭ helpi al aliaj lerni. Tio estas la devo de ĉiu serioza kristano. Do praktike, mi opinias, ke nia revuo „*Dia Regno*” devas esti uzata por tiu celo. Do tiu revuo devas esti nia helpilo por lerni, por instrui kaj ankaŭ por propagandi. Verŝajne vi diros: **bone, tia ĝi estu**. Sed tiam ne preteriru preter novaj demandoj sed respondu, pridiskutu ilin.

Mi pardonpetas pro miaj tre malnovaj citaĵoj kaj revenoj al la revuo, sed tion mi bezonas por esprimi mian opinion. Pli frue mi estis nur komencanto en la Kristana Esperanta movado kaj skribis, sed ne alsendis al la redakcio pri la menciitaj demandoj.

Leland Bryant Ross proponas (*Dia Regno* Nr.9[78 1] 1996 p.3-7)) „...la eklezio devus bonvenigi, subteni; kaj je iuj okazoj 'geedzigi' gegejojn...”. Tiu propono estas kontraŭ la Biblia instuo, Jesua instruo. Kiu tiutempe kontraŭstaris? Neniu. Mi ne trovis en „*Dia Regno*” respondon nek de la episkopoj, la pastroj, la instruistoj aŭ nur la simplaj kristanoj. Miaj karaj, ĉu ni tiam ne pekis? Mi ne kredas, ke ne-

niu tralegis la artikolon „*Disney, gejoj kaj baptistoj*”. Do ne preterlasu similajn okazojn estonte. Esprimu viajn opiniojn, ĉar se vi silentas, tiam vi subtenas la proponon. Do tio ankaŭ estas Misia laboro.

Nun iom pri la lingvo Esperanto. Mi ne povas diri, ke mi estas forta en la Esperanto-kono, sed mi penas paroli kaj skribi kompreneble kaj klare, ke komprenu ĉiu esperantisto, ne nur sciencisto. Mi volas skribi pri la vorto „Kopirajtas”. Mi klare komprenas, ke tio signifas la rajton kopii, ĉar estas uzataj du vortoj: „kopii” kaj „rajtas”. Se „ne rajtas”, tiam esperantisto skribas „ne rajtas” aŭ „Kopii estas malpermesate”, aŭ pli mallonge „Kopii malpermesate”. Ĉu tiu esprimo estas nekomprenebla? Kial uzi dubindan esprimon en Esperanto lingvo?

En mia artikolo vi vidas uzatajn multajn citilojn. Ĉu ilin ni bezonas? Mi dirus — nepre uzu. Mi denove volas reveni al pasinta tempo. Mi miris, kiam mi tralegis artikolon de Mervyn Jackson: „Kiom da kompato al malbonuloj?” Por la artikolo estis uzita parto de la parabolo (Luko 20:9-16) (*Dia Regno* Nr. 12. 1996, paĝo 3[91]).

Jesuo parabolon finas per la vortoj „...*Li venos kaj pereigos ĉi tiujn kultivistojn kaj donos la vinberejon al aliaj*”. La versiklo per tiuj vortoj ne finiĝas. „*Kaj aŭdinte tion ili diras: 'Ne tiel estu'*”. La artikolo de la aŭtoro certigas, ke la lasta frazo estas dirita de Jesuo, sed fakte ĝin diris „ili”, tio estas — la aŭskultantoj. Tiamaniere la artikolo havus tute alian finaĵon. Ĉiu, kiu ne bedaŭras pro la propraj pekoj, sed spite, intence pekas, estos punita. Mi komprenas eraron de la aŭtoro. En la anglalingva Biblio ne estis uzitaj citiloj. Same en la Esperantlingva Biblio, sed germanoj uzas, litovoj kaj latvoj ankaŭ uzas ilin. Internacia lingvo de-

vas esti klara kaj plene komprenebla kaj mi pensas, ke citilojn („”) ni devus uzi. La leganto devas scii, kie komenciĝas la citaĵo kaj kie ĝi finiĝas.

Mi proponas por tiuj, kiuj petas helpon de la „Kristana Misio” malfermi en la revuo „*Dia Regno*” anguleton. Ili skribu, kvankam ne tre perfekte pri siaj problemoj. Per tio ankaŭ aliaj povos ion lerni.

Nun estas vintra sezono. Mi pensas, ke tiu ĉi artikoleto kaptos atenton de multaj kaj mi esperas trovi en la „*Dia Regno*” multajn opiniojn. Personajn leterojn ni atendas laŭ adreso: **Erikas Laiconas, Aušros takas 14, LT-3000, Kaunas, Litovio**.

Tio estu la koresponda adreso de Kristana Misio de KELI.

Erikas LAICONAS

AMO NENIAM PASAS

La ŝtono estas forta,
sed ĝin disrompas la fero.

La fero estas forta,
sed ĝin knedigas la fajro.

La fajro estas forta,
sed ĝin estingas la akvo.

La akvo estas forta,
sed ĝin vaporigas la suno.

La suno estas forta,
sed ĝin mallumigas la nubo.

La nubo estas forta,
sed ĝin dispelas la vento.

La vento estas forta,
sed ĝin rezistas la homo.

La homo estas forta,
sed lin teren batas la morto.

La morto estas forta,
sed pli forta ol la morto

Estas la amo.

La amo neniun nenio venkos!

La poemon de nekonata aŭtoro
tradukis Jacques TUINDER

ADORU

Eldonita de IKUE kaj KELI, eldonejo PONTO-
VERLAG 2001 ISBN 3-9803793-5-3, 1472 paĝoj,
105 x 190 mm. Presita sur 33-g-fajna biblia pa-
pero solide bindita kun ruĝa lina kovraĵo.

Kristana kantlibro en Esperanto kun la titolo ADORU aperis en junio 2001, produktita en la presejo de la renoma eldonejo Herder en Freiburg, Brisgovio (Germanio). Temas pri evento komparebla kun la apero de Esperanto-tradukoj de la Sankta Biblio en 1926 kaj la Roma Melibro en 1995.

Ĝi enhavas liturgiajn tekstojn el diversaj tradicioj, rom-katolika, ortodoksa kaj reformacia. Pli ol 900 kantoj (kun muziknotoj) el pli ol 20 lingvoj spegulas la tradicion de almenaŭ dek konfesioj.

Por Diservoj okaze de Esperanto-kongresoj ĝi estas grava helpo, sed ankaŭ por persona uzo. Kiel literatura verko poezia, ADORU varbas por la intereso ankaŭ de esperantistoj ekster la kristana medio.

Redaktis la tuton la pastroj Adolf BURKHARDT (evangeliana) kaj Albrecht KRONENBERGER (katolika). Gitarajn akordojn reviziis kaj komponis renoma fakulo, eklezia muzik-direktoro Ernst LEUZE.

La verko, sur plej alta profesia nivelo, tre taŭgas varbo—cele por prui al kristanoj kaj eklezianoj, ke Esperanto vivas ankaŭ en la eklezioj kaj utilas por interpopola kaj interkonfesia kompreniĝo.

La libro kostas 19,80 EUR plus sendokostoj(*). Ĝi estas mendebla ĉe la libroservoj aŭ rekte ĉe: Bernhard EICHKORN, Romäusring 20, DE-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio.

Luksa eldono ankaŭ haveblas: en nigra ledo bindita, kun orumita tranĉ-rando, 48 EUR plus sendokostoj(*)

(*) Sendokostoj varias laŭ la lando al kiu ni sendos la libron: Por ĉiu mendita libro: Eŭropo: 3,62 EUR — Afriko, Azio, Ameriko: 3,88 EUR — Oceanio: 4,14 EUR.

INTERNACIA SOMERA KURSO EN ESPERANTO- GÅRDEN

Esperanto-Gården ĉi-jare organizos la 17-an Internacian Someran Kurson en Lesjöfors. Ĝi okazos 24-29 junio kaj por tiuj kiuj deziras daŭrigi la kunestadon kaj helpi pri la prizorgado de la ejo eblas resti du pliajn semajnojn kiel ano de internacia laborbrigado. Jam la duan fojon tion ebligas Esperanto-Gården kunlaboro kun la volontula organizaĵo SCI.

Esperanto-Gården estas kursejo kaj gastigejo kiu situas meze inter Stokholmo kaj Oslo, en okcidenta Svedio. Ĝin posedas internacia kooperativo de esperantistoj. Ĝi ankaŭ funkcias kiel migrula hejmo aŭ junulargastejo kunlabore kun la Sveda Turisma Asocio (STF) kaj la internacia IYHF/HI. Ĝi ankaŭ havas restoracion kaj bonvenigas kursojn de ĉiuj specoj.

Ni invitas al semajnaj Esperanto-kursoj diversnivelaĵ — komencanta, progresanta, kaj konversacia. Ni ankaŭ havas kombinan komencant- kaj metodkurson por instruistoj — se la nombro da aliĝantoj sufiĉos. Gefiloj kaj genepoj estas bonvenaj al la infana grupo, kie oni lernas per desegno, ludado kaj kantado.

Instruado: 6 lecionojn ĉiutage kun svedaj kaj eksterlandaj instruistoj. Ankaŭ en la komenca kurso la parolata lingvo estos en la centro laŭ rekta metodo kaj studmaterialo ellaborita en la Esperanto-fako de Karlskoga Popola Altlernejo.

Je la vespera kaŝtrinkado ni inter alie informos pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia ideo (ni interpretos por novuloj en la lingvo), montros lumbildojn, videojn kaj librojn, rakontos pri vojaĝoj. Kompreneble ni ofte kantos en Esper-

anto. Ne forgesu kunporti muzikinstrumenton, lumbildojn aŭ aliaĵojn por simpla distrado.

Eblecoj partopreni en ekskursoj kaj liberaeraĵ aktivecoj.

Vi povas elekti diverskoston loĝadon: unu- aŭ dultan ĉambron, multlitan ĉambron aŭ amasloĝadon. Vi ankaŭ povas dormi en propra tendo aŭ en ruldomo. Ni manĝos kune en la kursmanĝejo. Belaj ĉirkaŭaĵoj. Promena distanco al vendejoj. Kvar kilometrojn al bela liberaera banejo.

Karlskoga Popola Altlernejo jam fariĝis konata, internacia Esperanto-centro pere de la tutsemestraj kursoj de la Esperanto-fako. Ĉi tien oni ankaŭ lokis Internacian Junularan Kongreson.

Antaŭe ni aranĝis la somerajn kursojn en la Popola Altlernejo kaj ni tre ĝojas, ke ni nun povas loki ilin en Esperanto-Gården en Lesjöfors.

Bonvenon al belega regiono kaj riĉiga somera kurso kun gaja etoso kaj afablaj homoj el diversaj landoj!

Jam partoprenis studentoj de kvardeko da nacioj en la instruado.

Kurstempo: 24-29 junio (ebleco resti du pliajn semajnojn por internacia laborbrigado, sed bv. antaŭanonci vian deziron partopreni la laborbrigadon. Partoprenantoj en la laborbrigado manĝas laŭ loĝas en amasloĝejo senkoste).

Kostoj: 1075-2490 (amasloĝejo — unulita ĉambro), infanoj ĝis 15 jaroj — duonprezo, krompagoj por ekskursoj.

Aliĝu ĝis la 31a de majo 2002

Eksterlandanoj rajtas pagi surloke.

Esperanto-Gården, SE-680 96 Lesjöfors, SVEDIO

telefono: +46 (0)590 - 309 09

fakso: +46 (0)590 - 303 59

ret-adreso: eGarden@esperanto.se

Interredaktore

BALTA ESPERANTO FORUMO

«La Ondo de Esperanto» invitas al la unua BALTA ESPERANTO-FORUMO, kiu okazos en KALININGRAD (Ruslando) 14-18 jul 2002 kiel kvintaga renkontiĝo kun vasta socia, kultura kaj turisma programo.

LA SOCIA PROGRAMO enhavos prelegojn pri la historio, nuntempo kaj estonteco de Kaliningrad/Koenigsberg kaj ties regiono, kiu estas samtempe Ruslanda kaj Eŭropa, kaj publikan diskuton al kiu ni invitos diverstendencajn fakulojn. Krome, ni diskutos la rolon de Esperanto en la nuntempa mondo, kun speciala atento al Baltio.

LA KULTURA PROGRAMO enhavos interesajn prelegojn, interalie pri Vladimir Varankin kaj ties ĉefverko «Metropoliteno» (Varankin ĉi-jare centjariĝas), pri la kultura gazetaro en Esperanto, pri «Eugeno Onegin»... La redakciaĵoj de «La Ondo de Esperanto» respondos demandojn de la legantoj. Okazos seminario pri literatura kritiko; funkcios literatura rondo. En BEF estos premiere prezentita la unua volumo de la kvinvoluma verkaro de Fjodor Dostojevskij en Esperanto.

LA TURISMA PROGRAMO ebligas konatiĝi kun la urbo kaj ties muzeoj, viziti la banurbojn (ĉi-jare 750-jariĝos Zelenogradsk/Cranz), kaj simple ripozi ĉe la maro. La urbo enhavas amason da terasaj refreŝigejoj, kie oni povas agrable babili ĉe kruĉo da biero.

Funkcios libroservo, foiro de esperantaĵoj, fotoekspozicio kaj libera tribunalo. Pliaj programoj estas bonvenaj.

Inter la partoprenantoj estos pluraj redakciaĵoj kaj kunlaborantoj de «La On-

do de Esperanto» kaj «Sezonoj», interalie: Aleksander Korĵenkov, Halina Gorecka, Alen Kris, Wolfgang Kirschstein, Valentin Melnikov, Vladimir Vyĉegĵanin, Aleksej Birjulin. Partoprenos ankaŭ litoviaj kaj pollandaj aktivuloj, ekzemple: membro de la litova parlamento, Stasys Kružinauskas, gvidanto de Vilna literatura E-rondeto Valdas Banaitis, gvidanto de E-rondo «Kastelo» (Malbork) Eduard Kozyra k.a. Ili kontribuos per prelegoj, kaj kun multaj el ili oni povos konatiĝi tra la serio de programoj «Unu horo kun...»

Kaliningrad estas nemultekosta urbo. Ĝi estas ligita buse kun Germanio, Estonio, Latvio, Litovio, Pollando kaj Belorusio. Trajnoj venas el Moskvo, Peterburgo, Harkiv, Gdynia, Homel. Litovianoj rajtas senpage veni en

Kaliningradan regionon. Pollandanoj bezonas nur turisman vouĉeron (aĉetebla ĉe la limo aŭ en turismaj oficejoj). Loĝantoj de aliaj landoj devas havi ruslandan vizon.

Ĝustatempe konsultu konsulon de Ruslando por scii, kiuj dokumentoj estas necesaj por vizo.

Pliajn informojn petu ĉe la organizantoj:

«La Ondo de Esperanto» / «Sezonoj»

Adreso: RU-236039 Kaliningrad, p.k.

1248, Ruslando

Retadreso: sezonoj@gazinter.net

http://Esperanto.Org/Ondo

Telefono: (0112) 566033



Financa Raporto de KELI 2001 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2000	2001
Aktivoj	PB-Giro (PB = Postbank NL)	686,94	287,98
	PB-Kapitaalrekening (3,25%)	11.293,95	11.935,18
	PB-Rentumatesto (4%)	18.151,21	18.151,21
	UEA-konto kelk-p	201,68	1571,95
	Kasista kaso	47,75	51,64
	Monrimedoj	30.381,53	31.997,9502
	E-Misio, 4% prunted. K.Leja	1.256,48	939,41
	Kuranta konto K. Leja	3.958,72	3.218,03
	Pavel Polnicky, EB	73,58	51,57
	Komputilo	56,72	0,00
	Faksilo	47,19	0,00
		5.352,69	4.209,01
	Stokoj (libroj)	383,25	347,66
	E-Misio, Kasedoj D.K.	211,60	211,60
		584,86	559,26
	Transitaĵoj	550,00	285,88
	Aktivoj sume	36.618,65	37.052,09
Pasivoj	Kapitalo	3.892,94	3.898,14
	Saldoj negativa/positiva	956,43	935,21
	Kapitalo entute	4.849,37	4.833,35
	Dumvivaj membroj	2.500,84	2.746,81
	E-Misio	5.802,47	6.890,18
	Helpa Kaso	3.208,61	2.795,37
	Junulara helpa Kaso	337,45	337,45
	Kongresa reserva Kaso	1.871,88	1.871,88
	Literatura/Himnara Kaso	12.427,86	12.427,86
	Informada/Varbada Kaso	54,72	54,72
	Legaco C.P.W.	2.268,90	2.268,90
	Legaco E.t.O.-W.	2.268,90	2.268,90
	Fondusoj entute	30.741,64	31.662,07
	Kreditoroj	832,63	287,22
	Transitaĵoj	195,01	269,45
		1.027,64	556,67
	Pasivoj sume	36.618,65	37.052,09

Rezulto 2001 kaj buĝetoj 2001, 2002 kaj 2003 (Ĉiuj sumoj en EŬR)

	Buĝeto 2001	Rezulto 2001	Buĝeto 2002	Buĝeto 2003
Elspezoj				
Presisto	4.084	4.116,03	4.200	4.400
Imposto VAT	599	0,00	0	0
Perantoj	9	0,00	20	20
Revukostoj	4.692	4.116,03	4220	4420
Komputilo	57	56,72	0	0
Faksilo	47	47,19	0	0
Amortizoj	104	103,91	0	0
Prezidanto	45	30,00	30	30
Sekretario	59	33,50	60	60
Redaktoro	91	114,00	120	120
Kasisto/Matrikulisto	91	79,47	90	90
Estrarbulteno	36	22,01	30	30
Estrarkostoj	322	278,98	330	330
UEA-kotizo	50	48,00	50	50
Ĉambro de Komerco	34	31,20	35	35
Kaskontrolo	27	19,78	30	30
Bankkostoj	23	44,58	35	35
Merituloj	23	0,00	35	35
UK Lukostoj	68	90,00	90	90
Ĝeneralaj kostoj	225	233,56	275	275
Librovendado (kostoj)	-	117,08	100	100
Varbado (Inf./varba kaso)	23	0,00	25	25
Elspezoj entute	5.366	4849,56	4950	5.150
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	3.086	3.347,99	4.000	3.900
Kotizpagdiferencoj	9	5,67	10	10
Rabatoj de Perantoj	-23	-23,37	-25	-25
Librovendado	0	232,68	200	200
Kotizoj entute	3.072	3.562,97	4.185	4.085
Rentumoj	1.044	892,05	700	700
Adopta Kaso	908	1.329,75	900	900
Enspezoj entute	5.024	5784,77	5785	5685
Saldoj	338,99	935,21	835	535

Aktivoj

PB-Rentumatesto (4%)	fiksdata ĝis 10.12.2002 (PB = Postbank NL)
E-Misio, pruntaĵo (4%)	al K.Leja, repagota en 2002
Pavel Polnicky, EB:	Li ricevis monon por sendado de Estrara Bulteno, sed mankas prizorganto.
Kuranta konto K.Leja:	Pro antaŭpago por DR fine de 2001 iomete pli alta ol duonjara antaŭpago, resto vonos el la repago de la pruntaĵo.
Stokoj:	Sanktaj Biblio (9), Novaj Testamento (broŝ. 73), Novaj Testamento bind. 29), Evangelioj laŭ Johano (301), Adoru Kantante (10)
E-Misio kasedoj:	Dimanĉa koncerto (73)
	La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston.
Transitaj:	285,88 EUR rentumo el Kapitaalrekening 2001

Pasivoj

Kapitalo:	Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fonduso
Saldo positiva:	Pro nia kotizaltigo en 2000 nun dauros la positiva saldo.
Dumvivaj membroj:	Unu nova dumviva membro.
E-Misio:	La kapitalo kreskis pro repago de la pruntaĵo en 99/00/01. Ni pagis el la kapitalo 14 ekzemplerojn de ADORU por la ekssocialismaj landoj.
Helpa kaso:	Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. En 2001 ni helpis al 3 personoj.
Literatura/Himnara kaso:	La rentumo iras al Adopta Kaso
Kreditoroj:	Hungara kaso 237,33 EUR (Iren Bagi), Ĉeĥa kaso 13,63 EUR (Pavel Polnicky), Brita kaso 36,25 EUR (Tom Neil)
Transitajhoj:	Prezidantaj kostoj 30 EUR, Sekretariaj kostoj 33,50 EUR, Antauricevitaj kotizoj 205,95 EUR

KLARIGOJ PRI LA REZULTO 2001 KAJ LA BUĜETOJ 2002/2003

Kotizoj pagendaj de

Membroj individuaj	187 (206)	Nuraj abonantoj ...	25 (23)
Membroj familanaj	18 (21)	IKUE-abonantoj ...	16 (14)
Membroj subtenantaj	5 (3)		41 (37)
Membroj dumvivaj	30 (29)		
Membroj adoptitaj	166 (169)		
	406 (428)		

Malkreskas la membraro, grandparte pro maljuneco. Tamen ni estas vivanta, ni ja ankaŭ gajnis novajn membrojn/abonantojn.

Librovendado: Ni vendis kelkajn librojn al UEA kaj havis enspezojn. La elspezoj tiurilate estas ilia valoro el la Aktivaj.

Rentumo: Ni esperas noveldoni la Biblion en 2002 kaj pagos el la kapitalo. Pro tio la rentumo malkreskos.

Adopta Kaso: Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Jugoslavio, Latvio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan Dankon al iuj donacintoj kaj donacontoj.

Saldoj 2001, 2002 kaj 2003: Estas kaj estos positiva pro nia kotizaltigo en 2000 kaj 2002.

Heilbronn, 2001-04-05

Siegfried Krüger, kasisto

SEKRETARIA
JARRAPORTO PRI LA
JARO 2001

Denove aperas en *Dia Regno* la sekretaria jarraporto. Dank' al ricevita informoj el diversaj landoj mi povas raporti al vi. Al ĉiuj personoj kiuj sendis informojn mi kore dankas. Ne pensu ke viaj aktivecoj ne estas interesaj por aliuloj.

Komunikado: Dank' al la nova medio, la elektronika poŝto, iras informoj kaj reagoj pli rapide trans la limoj.

Vi ĉiuj estas petataj aktive kunlabori. La redaktoro de *Dia Regno*, Philippe COUSSON, ricevis interesajn artikolojn sed li ankaŭ estonte bezonos materialon. *Dia Regno* estas valora periodaĵo.

La *Estrara Bulteno*, prilaborita de David FEATHERSTONE, ne plu funkciis. Ni uzis la elektronikan poŝton kaj la adreson de la *Dia Regno* Yahoo-grupo. Per tiu ĉi metodo ricevis multaj personoj la saman mesaĝon. Philippe COUSSON renovigis la KELI tt-paĝon en la Interreto: <www.chez.com/keli> estas la adreso.

La estraro komencis la esploron rilate la novan eldonon de **Ekumena Biblio** kun dua-kanonaj libroj. Gerrit BERVELING jam tradukis la dua-kanonajn librojn. La Biblia stoko tre malgrandiĝis.

Diservoj: Kadre de la Faulhabersemajnfino organizita de Esperanto **Nederlando** en la unua semajnfino de oktobro, okazis Diservo en la preĝejo salono de la kongresejo. Jacques TUINDER gvidis ĝin.

En Britio okazis regule Diservoj en Esperanto en Bristol kaj Londono. Kadre de la Aŭtuna Studrondo de la Esperanto-Asocio de Skotlando en Dunblane, estis aranĝita Ekumena Diservo en

la kapelo de la kongresejo. Gvidis David THORNELL.

En Finnlando aranĝis KELI-anoj Diservon kadre de la Vintraj Tagoj de la Esperanto Asocio de Finnlando, la 30-an de septembro en la kapelo de la katedralo de Helsinki. Matti PERSONEN gvidis kaj predikis.

En la kadro de la **Germana** Esperanto-Kongreso estis la Ekumena Pentekosta Diservo je sabato, la 2-an de junio en la kapelo de la kongresejo en Oggersheim/Ludwigshafen. En Hamburgo okazis Ekumena Diservo en la kadro de la Eŭropa-Semajno. En Stuttgart kaj Speyer estis unu foje monate ebleco ĉeesti Ekumena Esperanto-Diservo. En la Berneuchener Haus (iama kloster Kirchberg) nun posedaĵo de la Evangelia Michaels-frataro, okazis tre speciala Ekumena Diservo. Deĵoris la teamo kiu eldonis Adoru, la novan ekumenan kant- kaj preĝlibron. Predikis pastoro Adolf BURKHARDT, orgenludis Ernst LEUZE, kunlaboris la pastroj Bernhard EICHKORN kaj Albrecht KRONENBERGER kaj Vikariino Ulrike TREUSCH.

En oktobro, dum la Ekumena Semajnfino (temo: Adoru) en La Chaux-de-Fonds (**Svislando**) estis aranĝita speciala Ekumena Diservo en urba preĝejo. Kompreneble estis uzita Adoru. Kantis la hungara kantistino Anjo Amika himnojn de sia kasedobendo Dimanĉa Koncerto.

Okaze de la jarkunveno de la **sveda** KELI-sekcio estis aranĝita Diservo je la 5-a de majo en Stockholmo. Mats LANDFORS predikis. Agneta JÄRLSTRÖM kaj Torsten SELÉN akompanis per gitaro kaj violono.

La Ekumena Diservo kadre de la 15-a Ekumena Kongreso en **Zagreb** okazis dimanĉe, la 15-an de julio. Gvidis Jacques TUINDER kaj predikis pastoro

Adolf BURKHARDT.

Post la Ekumena Kongreso sekvis la Universala Kongreso kies Ekumena Diservo okazis en la katedralo de Zagreb. Predikis pastoro Adolf BURKHARDT. Celebris pastroj el diversaj landoj. Akompanis per orgenludo Ernst LEUZE.

El la sekcioj: La Nederlandanoj kunvenis en aprilo en la hejmo de Nel VAN IPEREN. Post la jarkunveno sekvis distra programo. Jacques TUINDER estis la prezidanto de KELI kaj Els VAN DIJK jam dum 20 jaroj la KELI-sekretario kaj ekde kelkaj jaroj ankaŭ estrarano de Esperanto Nederland. Wil VAN GANSWIJK instruis Esperanton al pli ol 50 grandparte junaj homoj per sia tt-paĝo en la Interreto. Ankaŭ en ŝia hejmo kunvenis gelernantoj. En novembro mortis Henk DE HOOG, iama prezidanto de KELI, membro de la Akademio de Esperanto kaj verkinto de Nia Historio. Jacques TUINDER batalis kontraŭ blinceco kaj vojaĝis al pluraj malriĉaj landoj. Plurfoje li iris pro invito de blindaj Esperantistoj al foraj landoj. Estraro: sekretario, Els VAN DIJK; kasisto, Gerda DERCKS; membroj Nel VAN IPEREN kaj Leen HORDIJK. Fine de la jaro 2001 havis la sekcio 26 membrojn de KUNE/KELI, 5 nur de KELI, 2 nur de KUNE kaj 4 familiajn membrojn.

Bjelorusio, Rusio, Ukrainio, Kazahstano. Dudek membroj havis per-lete-rajn kontaktojn. En la urbo Niĵni-Tagilo kie loĝas KELI-reprezentantino Larisa KUZMENKO, kunvenis regule 8 membroj de la klubo Renaskiĝo. Ili legis el la Biblio, kantis kristanajn kantojn kaj pristudis artikolojn el *Dia Regno*. Pro la malfacila ekonomia situacio estis vojaĝado ne ebla. La membroj de la klubo de Larisa helpis en la Dimanĉaj lernejoj per interalie la aranĝado de festoj por la infanoj, instruado de la Biblio. Oni ankaŭ hel-

pis malriĉulojn per vestaĵoj kaj legomoj. La kristanaj Esperantistoj ĝojis pri la ricevado de *Dia Regno*.

La **Finna** sekcio havis fine de la jaro 27 membrojn. Mortis Marjatta LINJAMA kaj 3 membroj ekŝiĝis. La ligo kunvenis 2 fojojn: Kadre de la Vintraj Tagoj en Hämeenlinna kaj Aŭtunaj Tagoj en Helsinki. Cirkulero estis sendita 4 fojoj. Verkis ĝin Olavi KANTELE. La enhavo konsistis el alvoko al kunsidoj, devotaj tekstoj, kongresaj informoj. Estraro: prezidanto, Olavi KANTELE; vic-prezidanto, Matti PERSONEN; kasisto, Soili SALMINEN; membroj Heta KESÄLÄ kaj Heli YRTTIAHO.

En Britio aperis regule la sekcia revuo *Kristana Alvoko*. Redaktoroj estis Peter kaj Audrey HAYWARD. Ili serĉis posteulojn. Estraro: prezidanto, David BISSET; sekretario, Yvonne KNOWLES; kasisto, Tom NEIL; redaktoroj Peter kaj Audrey HAYWARD.

La KELI-reprezentanto en **Litovio**, Erikas LAICONAS eldonis la gazeton *Litovia Kristano* kaj li estis reprezentanto de Esperanto Misio.

La **Sveda** KELI-sekcio fariĝis sekcio ene de la Sveda Esperanto-Federacio. En la jarkunvenoj de 2000 kaj 2001 tion decidis la membroj laŭstatute. Estis 52 membroj. Okazis malfonda kunveno la 16-an de februaro. La jarkunveno okazis la 5-an de majo en Stockholmo. Arne LUNDKVIST prizorgis la eldonon de *Meddlemsblad*. Respondeculoj: prezidanto, Mats LANDFORS; sekretario, Agneta JÄRLSTRÖM; kasisto Bengt-Olof ÅRADSSON; membro, Leif NORDENSTORM.

La prezidanto de la **Franca** sekcio estis pastoro Alain MARTIN kaj la sekretario Philippe COUSSON kiu de multaj jaroj estis ankaŭ la redaktoro de *Dia Regno*. Li prelegis pri Esperanto en la Serva-

EKKONU LA REGIONON DE NIA KONGRESO!

Karaj Geamikoj kun sincera ĝojo mi invitas vin — jam la sesan fojon — kongresi en Hungario! La malgranda banloko Berekfürdő troviĝas proksime al la urbo Karcag, kiu situas apud la aŭtovojoj 4 kaj la trajnolinio al la direkto de Debrecen.

Antaŭ 36 jaroj, en 1966, la unuan fo-

jon okazis KELI Kongreso en Hungario ĝuste en la „Kalvinana Romo” en Debrecen. Tiuj, kiuj partoprenis ĝin eĉ nun rememoras pri la ekskurso al la romantika stepo „Pusztá” [pusta] Hortobágy. Ĉi tiu sama etendiĝas ĝis nia banloko Berekfürdő.



do de la Evangelio dum la posttagmeza programo de la regiona kunveno de sia Reformita Eklezio. La partoprenintoj donacis monon por la aŭtorrajtaj kostoj de la kantoj en *Adoru*. Philippe ankaŭ eldonis *La Ponteto*, franclingvan informilon por ne-Esperantistoj pri la Kristana Esperanto Movado.

La **Germana** sekcio okazigis sian jarkunvenon en la kadro de la Germana Esperanto-Kongreso, sabaton la 2-an de junio. Astrid HANKE aranĝis budon kadre de la Germana Evangelia Eklezia Tago en Frankfurt en kunlaboro kun la Germana Esperanto-Junularo. La germanlingva *Ökumenisches Esperanto-Forum* (*Ekumena Esperanto-Forumo*) eldoniĝis dank’ al pastoro Adolf BURKHARDT kaj pastro Bernard EICHKORN. Ĝi estis regule sendita kun la helpo de Endel OJASILD el Estonio kaj ĝi informis la germanparolantojn pri la Kristana Esperanto-Movado. Estraro: prezidanto, pastoro Lothar BAUMGARTEN; kasistino, Astrid HANKE; sekretario, Hella LANKA.

En la Demokrata Respubliko **Kongio** funkciis KEKO (Kristana Esperantista Konga Organizo) kies prezidanto estis Leonardo MATONDO. La klubo akiris

retadreson, organizis Zamenhoffeston kaj kursojn.

La KELI-peranto en **Usono** estis Jerald VEIT. Estis 9 membroj. Malfrua ricevo de *Dia Regno* estis daŭra problemo. Por iom kompensi tiun situacion kaj ankaŭ stimuli la ligecon inter la usonaj membroj, ili ricevis senpage la dumonatan bultenon *Kristana Espero*, kiun redaktas Jerald VEIT. Li ankaŭ prizorgis ĉiutagan Biblian Vorton en Esperanto en la interreto kaj lia bulteno *Kristana Espero* estis legebla per la sama medio.

Mi venis al la fino de mia raporto. Se vi opinias ke mankas interesaj informoj, bonvolu sendi ilin al mi. Mi kore dankas ĉiujn personojn kiuj jam agis tiel.

Estraro de KELI (inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo): prezidanto, Jacques TUINDER (2003); vic-prezidanto kaj redaktoro Philippe COUSSON (2003); sekretario, Els VAN DIJK (2004); kasisto, Siegfried KRÜGER (2002); membroj: BAGI Irén (2003); Adolf BURKHARDT, (2003); Bengt Olof ÅRADSSON (2003); Pavel POLNICKÝ (2002); Britta REHM (2003); Geoffrey DOROW (2003); SOMHEGY Zoltan (2004).

Els VAN DIJK-KUPERUS

Berekfürdő antaŭ 1932 estis nur sen-signifa malgranda vilaĝo kiu apartenis al la najbara urbo Karcag. En tiu jaro, serĉante hidrokarbonon oni borigis tie du putojn. En unu troviĝis tergaso en la alia 56 grada termalakvo riĉa je mineraloj. Oni tuj konstatis la altan valoron de ĉi tiu „trovaĵo” kaj de 1932 jam ekfunkciis tie kuracbanejo.

La kuracakvo de Berekfürdő unuavice konvenas por resanigi malsanojn de movorganoj, por readaptado post akcidentoj. Krom tiuj ĝi bonefikas ĉe nervo kaj ginekologiaj malsanoj. La kurac- kaj strandbanejoj baziĝas je la abunda kuracakvo jodoza kun alkali-hidrogen-karbonato.

En la tereno de la banejo troviĝas 6 banejoj subĉielaj kaj du tegitaj. Estas uzablaj ankaŭ kompletigaj servoj sub kuracista kontrolo. Pro kaj ĉirkaŭ la banejo evoluas agrabla banloko, konservante tamen ĝis nun familiecan etoson de vera vilaĝo.

Berekfürdő famiĝis ankaŭ pri sia vitrofabriko kiu estis lokigita surbaze de la tergaso trovita ĉi tie. Per speciala teknologio oni produktas belajn artobjektojn, vazojn, glasojn el la tn. „vual-vitro”. La ekspoziciejo kaj vendejo de la vitrofabriko troviĝas ĉirkaŭ 300 metrojn de nia kongresejo.

Proksime al la naturo

Post la 19-a jarcenta rivero-regulado multe ŝanĝiĝis la regiono. La agrikulture utiligebla tereno vere kreskis, sed tio signifis ankaŭ la pereon de la riĉega flaŭro kaj faŭno de la marĉa vivo.

La mastrumanta homo konstante provis retirigi la malsekajn terenojn, sed post pluvoriĉaj periodoj la akvo-mondo por iom da tempo reviviĝas kaj reokupas la forlasitajn fluejojn.

Post konscia agado, organiza kaj protekta laboro de scienculoj, granda parto de la fama „Pusztá” jam estas naturprotektata regiono. La Nacia Parko Hortobágy mem fariĝis akceptita de UNESCO kiel parto de la Mondheredaĵo. Ĝi ampleksas jam 81 mil hektarojn.

Krom unikaj kreskaĵoj tie oni savis, gardas kaj bredas ankaŭ „indiĝenajn” bestojn, kiel la faman, fortan grizan bovon, la ŝafon „Racka”, ŝafo-gardajn hundojn, iun specialan anseron kaj la porkon „mangalica”.

Kelkajn terenojn turistoj rajtas viziti nur kun gvidanto, perpiede aŭ bicikle sen aŭtomobilo. Sed ekzistas ankaŭ agrabla, permesita veturilo — kiun ankaŭ ni uzos — ni ŝanĝos la aŭtobusojn je duĉevalaj ĉaroj.

En nia epoko — preskaŭ jam tro malfrue — en pli evoluinta parto de la mondo oni klopodas haltigi la frenezajn „kreskigon” de amasproduktado kaj konsumado, rimarkinte kiel ekŝanceliĝas la ekvilibro de la naturo.

Ni esperas, ke nia popolo ankoraŭ kapablos konservi sobrecon kaj ne blindiĝi pro tentoj de luksaĵoj superfluaĵ.

Iom da historio

Veturante de Budapeŝto orienten al la direkto de Debrecen iom post iom malaltiĝas kaj malaperas eĉ la malaltaj montetoj kaj etendiĝas antaŭ niaj okuloj la stepo, la herboriĉa ebenaĵo, kiu antaŭ pli ol mil cent jaroj tiel kaptis la koron de la prahungaroj ke ili deziris loksidiĝi ĉi tie. Ili paŝtis ĉevalgregojn kaj bovarojn, fiŝkaptis kaj ĉasadis, do ĉi tiu tereno donacis al ili ĉion necesan. En la unuaj jardekoj plurfoje okazis tamen, ke ili atakis okcidentajn urbojn, monaĥejojn — kiel atestas pri tio en la 9-a jarcento preĝo notita en iu monaĥeja kroniko „Savu nin Sinjoro de la sagoj de hungaroj!”

Sed ni havis saĝajn estrojn, kiuj komprenis, se ni deziras ekloĝi kaj daŭre resti ĉi tie, ni ne rajtas daŭrigi ĉi tiun vivmanieron. Ili invitis misiistojn, fondis monaĥejojn kaj signis la lokojn por la diversaj triboj de la popolo. Tie ili konstruis domojn, komencis kulturadon de la tero, konstruis preĝejojn.

Kristanismo estis jam konata por la hungaroj, ja ili renkontis dum sia migrado la bizancan formon de la religio. Sed niaj saĝaj estroj elektis la okcidentan kristanismon kaj ĝian ĉefpastron la papon de Romo.

En la 11-a–12-a jarcentoj jam fortiĝis la hungara reĝlando. Tial, kiam en la 13-a jarcento denove ekmoviĝis Azio kaj pro la forta premo de la potenca mongola imperio kelkaj popoloj ekmigris okcidenten, ili petis rifuĝejon de la hungara reĝo. Unue alvenis Kumanoj poste Jazigoj kaj ili ricevis lokon en la mezo de la lando, ĉi tie en la Granda Ebenaĵo. Ilia promeso kaj devo estis se la mongola invado atingos ankaŭ nian landon, ili helpos kontraŭstari. Tamen la forta atako ne estis haltigebla kaj en la mezo de la 13-a jarcento eĉ la reĝa familio devis rifuĝi suden al Kroatio. Post la subita retiriĝo de la mongoloj oni devis preskaŭ ĉion rekonstrui kiel post incendio.

La kumanaj kaj jazigaj triboj restis ĉi tie. Longe ili konservis ankaŭ siajn lingvojn kaj fiere distingis sin de aliuloj. Pro la entrepreno de perarmila militservo ili akiris privilegiojn, ne pagis impostojn, havis propran administradon. La tereno kie ili loĝas estas nomata (ankaŭ nun) Nagykunság (Granda Kumano). Okcidente situas Kis- (malgranda) kunság kaj iom norde vivas posteuloj de la jazigoj en Jászság (jás-ŝág).

Kompreneble ili sentas sin hungaroj, ili estas fidelaj patriotoj, sed ili fieras pri

sia kultura identeco kaj pri sia vere originala popolarito.

Post la 150 jara turka okupiteco (16-a — 17-a jarcento) sub kiu estis ankaŭ ĉi tiu regiono, okazis al ili terura plago: la Habsburga imperiestro forvendis ĉi tiun terenon (kiel proprajn!) al la Ordeno de Teŭtonaj Kavaliroj. La memkonscio de la kumanoj ne toleris longe ĉi tiun humiligan staton kaj kun granda fortostreĉo la tuta popolo kolektis la postulitan monon kaj ili „reaĉetis” sian liberecon kaj sendependecon. Tio estis la tn. „Redemptio” kiu plu fortiĝis la memkonscion de la Kumana popolo (hungare: kun).

Estante veraj spertuloj de ĉevalbredado ili estis ankaŭ famaj husaroj. Ĉiujare okazas festaj ludoj honore al Mihály Kovács, heroo de la milito por la sendependeco de Nordameriko, kiu tie organizis kaj gvidis husarregimenton laŭ „jász-kun” tradicioj.

Karcag

La centro de Nagykunság (nadjkunság) estas karakteriza kamparurbeto, tereno de legendoj. Multaj historioj ligiĝas al la „kun-montetoj” sur la kampoj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj ankaŭ al la romantika „betjar” — epoko de la 19-a jarcento. Ankaŭ hodiaŭ estas videblaj — kaj vizitindaj — metiejoj de popolartistoj, lertaj lignoskulptistoj, eminentaj meblistoj, famaj potfaristoj, puntistinoj, brodistinoj. Eminentaj folkloristoj de la regiono estis István Györfy, kiu lanĉis la ideon kolekti historiajn kaj etnografiajn memoraĵojn de la regiono. Nun en la muzeo „Nagykun” ni povas spekti la riĉan kolektaĵon el la paŝtista vivo, pentritajn meblojn kaj ceramikaĵojn.

Dum la malfacila „turka” epoko rapide disvastiĝis ĉi tie la reformacio, kiu en la gepatra lingvo anoncis la evangelion,

La 8-an de marto 2002 mortis David FEATHERSTONE, post sufiĉe longa periodo de ĝeniga malforto, kiu ŝajnas des pli netaŭga post la diversa agema vivo, kiun ĝi fermis.

Mi konis Davidon ekde miaj unuaj vizitoj al la Esperantaj Diservoj Londonaj, kie David amikiĝis al mi, kiel al ĉiuj vizitantoj, kun sia granda rideto. Kun tiu rideto li baldaŭ invitis min legi dum sia kristnaska Diservo la unuajn versojn de la Nova Testamento... kie listiĝas la nomoj de la hebreaj pragepatroj de nia Sinjoro. Ŝajne mia lego estis sufiĉe bona, ĉar ŝajne tre baldaŭ post tio, David invitis min gvidi tutan Diservon, verŝajne kun tiu sama rideto.

La unua mencio pri David en la registro de la Diservoj estas en 1980, kiam ni celebris en Kingsway Hall. Ekde tiam lia nomo aperas ofte en diversaj roloj — leganto, gvidanto, orgenisto aŭ pianisto. Kiam David gvidis Diservon, oni povis ĉiam antaŭĝui bonan predikon, kiu tre streĉe ligiĝis al la Biblio; kaj oni certe lernis multon pri aliaj malofte uzataj libroj de la Biblio. Oni povis tion diri ankaŭ

»»

konsolis, fortigis la subpremitan popolon. En ĉi tiu regiono la puritana kalvinismo estis akceptita, kiu baldaŭ klopodis konstruigi lernejojn kaj preĝejojn. Ni vizitis ankaŭ la centron de tiu reformacia vivo, la urbon Debrecen. Pri ties historio kaj vidindaĵoj ni pretigos apartan informilon por ĉiuj kongresanoj.

Mi esperas, ke vi havos belajn kaj interesajn spertojn pri tiu regiono kaj popolo! Venu kaj vizitu nin!

FARKAS-TATAR Éva

pri lia elekto de kantoj — oni diris al mi, ke David intencis dum sia gvidado uzi ĉiun kanton en la Himnaro Esperanta de BUTLER! Bedaŭrinde li ne sukcesis en tiu projekto, sed certe oni ne povis antaŭdiri tion, kion enhavos liaj Diservoj. Li estis ankaŭ entuziasma basisto kiam li ne pianludis. Lia partopreno daŭriĝis ĝis la lasta monato de lia vivo — nia antaŭĝuis, ke li partoprenos, kvankam preskaŭ silente, kvar tagojn post lia efektiva forpaso. Lia fideleco al la Diservo eĉ malgraŭ la malrapida korpa funkciado estis ja mirinda.

Ĉi ĉio fontis el la granda scio kaj scivolemo pri la Biblio kaj pri teologio, kiu okupis Davidon dumvive. Pri tio rimarkis instruisto en la lernejo, kaj eble tion oni povus gravuri sur lia tomboŝtono. Alia trajto de lia vivo, oni rimarkas la vojaĝdeziron. David laboris dum kelkaj jaroj en Irano, kaj ofte, ne nur dum siaj esperantistaj jaroj, feris en neordinaraj partoj de la mondo, kien iris li kun sia edzino Nora kaj dum ilia juneco la aliaj familianoj. Li laboris en la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, kaj ekde tiam li ligiĝis al la Esperanta versio de la Vorto de Dio.

David ĉiam estis pacemulo, neniam koleriĝis, ofte scivolis pri aferoj lingvaj kaj kristanaj. Ĉar ni veturis samdirekte el la Diservoj, David veturigis min al Krojdon en sia aŭto, kaj ni parolis multe pri ĉi tiuj aferoj dum la veturado. Tion ankaŭ atestas tio, ke je la funebra Diservo la preĝejo estis plenplena.

Nun vi ripozas, frato, post via multkolora vivo; Dio rekompencas vin pro via granda laboro kaj ekzempla vivo.

Ni kondolencas kun la edzino Nora kaj iliaj filoj.

Kevin BOURNE

Nekrologo

Nils JOHANSSON naskiĝis la 13-an de julio 1914 kaj mortis la 30-an de decembro 2001. Post komencaj studoj li iĝis komercisto por dolĉaĵoj. Esperanton li studis jam komence de la 1930-aj jaroj. Baldaŭ li iĝis membro de la novfondita Esperanto-klubo en Norrköping. Kiel bona organizanto li estis bona prezidanto de la klubo dum 25 jaroj.

La intereso por internaciaj demandoj gvidis lin fondi UN-asocion en Norrköping. Tie li estis aktiva membro dum pluraj jardekoj. Dum la lastaj 20 jaroj li estis blinda.

Multajn svedajn Esperanto-kongresojn li partoprenis. Li estis membro de KELI ekde 1960. Nils estas karmemore funebrata de lia edzino Alice kaj de la sveda Esperanto-movado.

Arne LUNDKVIST

Solve de la ŝarado (832)

1. kimono
2. animalo
3. telefono
4. elefanto
5. konfirmacio
6. uniformo
7. mano
8. ermito
9. naski
10. oblato

Kromsolvo: katekumeno.

Krucvortenigmo

1		2	3	4	5	6	7		8
		9							
10	11		12					13	
14		15			16		17		
18				19					
20			21				22		
23						24			
25			26					27	
		28					29		
30									

Kromsolvo

14	20	13	3	1	8
----	----	----	---	---	---

horizontale: 1. kristana festo, 9. sennube, gaĝe, 10. kemia simbolo de niobo, 12. senti surprizimpreson, 13. malgrandiga sufikso, 14. animalo en akvo, 16. mallumo, 18. plurala persona pronomo, 19. parte simil', 20. nazinflamo, 22. eben' limiganta volumenajon, 23. malekstrem', 24. vintro-sportila, 25. grupmembra sufikso, 26. nordafrika golf', 27. hebrea mezurun' por sekaĵoj, 28. rilata al tropika arbo, 30. direktivo.

vertikale: 1. konfirm', 2. preterita finaĵo, 3. tuto de la grajnoj, 4. numeralo, 5. romia imperiestro, 6. postvivanta la korpon, 7. kondiĉa subjunkcio, 8. korekta skribmaniero, 11. nombregnom', 13. rilate al geraniaca herbo, 15. ligna tabulet', 17. besta kri', 19. kora kavar', 21. mallongigo por Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj la Turismo, 24. plant', 28. kemia simbolo de arseno, 29. kemia simbolo de aktinio.

kromsolvo: Pentraĵo sur stukaĵo.

Fritz Lautenbach

EN RUMANUJO OKAZOS LA EŬROPA KUNVENO DE LA MONDA REFORMITA ALIANCO

en urbo Oradea, inter la 17 kaj 24-an de aŭgusto 2002

Post la propono akceptita de la Kunveno de Eŭropa Teritoria Konsilio en Málaga (Hispanio) pasintjare, la gvida konsilio de la Partiuma Reformita Episkopujo, jam la 1-an de junio en sia labor-kunsido, arigis la lokan organizan komitaton, gvidota de episkopo TÖKÉS László. De tiam la loka organiza komitato prilaboris sian agadplanon kaj akordigis ĝin kun organiza komitato, nomumita de Eŭropa Teritoria Konsilio de la Tutmonda Ligo de Reformitoj dum la kunveno okazinta en Oradea, la 16-17-an de novembro 2001. En Stokholmo, la 16-18-an de marto ĉijare okazis laborkunveno de la ETK, kie la konsilantaro analizis la laboron de la pasintaj sep jaroj de la organizo, kaj pritraktis pri la prioritatoj de la sekvonta sep jara periodo. Ĉi tie la delegacio de nia episkopujo denove akordiĝis pri la praktikaj, pedantaj demandoj kaj pretenoj rilate al okazonta kongreso kun la konsilianoj.

La okazonta TLR kongreso de la eŭropaj eklezioj, kiuj entenas ĉirkaŭ dek milionojn da reformitoj sur nia kontinento, proponas bonan okazon prezenti nian eklezion al la mondo. Sed gravas por ni la okazontaĵo ne nur pro la loko, sed ankaŭ pro siaj temoj.

La ĉeftemo de la kongreso: „La ple-nvaloro de la vivo — Universala vi-

do, loka agado”.

Dume, la 20-an de aŭgusto la kongreso formos sian starpunkton pri la temo: „Alfronti la pasinton”. La 21-an temos pri: „Minoritataj problemoj en Eŭropo”. La 22-an okazos la idea pre-parlaboro de la monda kongreso de TLR, okazonta en 2004 en la urbo Accra, kun ĉeftemo: „En alianco por la ekonomia justeco”.

Kiel delegitoj de la Partiuma episkopejo en la kongreso estos: episkopo TÖKÉS László, ĝenerala direktoro CSÜRY István kaj kiel observanto estis proponita pastro Herdean GYÖNGYI.

La delegitoj kaj invititoj de la kongreso, la 17-an kaj 18-an de aŭgusto (dimanĉe), antaŭ ol konferenci, vizitados niajn ekleziojn kaj predikos. La malferma Diservo de la kongreso okazos la 18-an de aŭgusto, je la oka vespere, en la Sporthalo de la urbo, kien estos invitotaj niaj eklezianoj. La 20-an de aŭgusto (marde), okazos en la urba teatro: Hungara reformita Solenaĵo, al kiu pere de konkurso estos invitotaj prezenti reformitajn ekleziojn hungarajn ankaŭ el eksterlande. Sin prezentos la koruso de la pola Evangelia Reformita Eklezio ĉe ni, okaze de la kongreso.

La 23-an de aŭgusto je la ferma tago, okazos la reelekto de estraro.

Niaj gastemaj eklezianoj elkore atendas la delegitojn kaj vizitontojn en nia urbo.